


LA VERDA LUPEO

28-a jaro



26(105) INFORMILO DE ELF-AREK JUNIO 96

SAT-KONGRESOJ



7-a 1927

ESPERANTO
19a SAT-
KOPENHAGO
5-10 AŬGUSTO 1939

1939

1934





1948 SAT-AMIKARO

La novelekto de prezidanto kaj vicprezidanto de ELF-AREK

Post la nombrigo de la enirantaj vocdoniloj mi konstatis, ke la rezulto estis surprize, ne atendite alta: el la 105 forsenditaj voĉdoniloj (1 jam tuj revenis kun la rimarko: ne konata) revenis entute 50 pecoj, do, 48,1%.

Nia nova prezidanto, s-ano Hermann Heiss, Oberkirch (Germanujo) estis elektita per 48 jesaj voĉoj kaj 2 sindetenoj. Per la sama fina rezulto ankaŭ estis elektita la nova vicprezidanto, s-ano Lech Kosieniak, Warszawa (Pollando). Koregajn gratulojn al ambaŭ de ĉiuj ELF-AREK-anoj, ĉefe de mi.

Richard Hirsch

ANONCOJ

Partopreninto en 36 filatelaj ekspozicioj kun E-ekspozaĵo kaj gajninto de multaj medaloj, ankaŭ oraj, proponas interŝanĝon de E-filatelaĵoj:
Janusz MIKULSKI, ul. Zolnierska 11 A/46, PL-10-558 OLSZTYN
(en antaŭa LVL ni erare skribis "Josef M.", bv. pardoni)

Nia nova membro:
Bernard WHEEL, 834 Wenonah Ave., OAK PARK, IL- 60304 USA
kolektas E-filatelaĵojn kaj afrikajn pm.

Deziras aĉeti la subajn stampojn nia:
Stanisław BIESIADA, skr.pocztowa 599, PL-42-217 CZESTOCHOWA
la numeroj estas laŭ nia katalogo:
Aŭstrujo 8 c, Belgujo 2, 6, Brazilo 1 U, 5, 10 a+b, Britujo 1, 2, 3, Ĉehoslovakio 1 aa + ab, 2, 3, Francujo 1, 5, 9, Germanio 3, F.R.Germanujo 2-2. Hispanujo 1, 2, Italujo 1, Jugoslavio 3-1, 3-2, Norvegujo 2, Svedujo 2. Krome neuzitajn TUT de Brazilo kaj Liĥtenŝtejno.

Maljuna E-filatelisto vendas sian kolekton kun kelkaj miloj da E-stampoj:
Mehmed JAKUPOVIC, Fronje Motkovica 16, HR-51000 RIJEKA (Kroatio)

Revas pri E-stampoj de antaŭ 1939 nia GOA Zhen-xing. Li proponas interŝanĝe ĉinajn filatelaĵojn kaj uzitajn telefonkartojn. Volonte li ankaŭ ŝatus ricevi de vi uzitajn telefonkartojn. Jen la adreso:
GAO Zhen-Xing, Jiashanlu 50 ĥao 4 haolou Yidanyuan 2 hao,
CN-266032 Shandong Qingdao, Ĉinio
Li ne povas sendi stampojn de HAIKOU, ĉar la tiea PMK ne respondas al stampopetojn.

EKSPOZICIOJ

Ni gratulas pro sukcesoj dum ekspozicioj

Ie mi legis hazarde, ke s-ino Terttu ÖSTERMANN, Finnlando, en Tutmonda Ekspozicio en SINGAPURO 1995 gajnis por ŝia ekspozaĵo ESPERANTO la ORAN Medalon. Krome informis nin nia HASALA, ke s-ro Vladimir VANA, Ĉeĥio, gajnis en la sama ekspozicio la Grandan ARĜENTAN Medalon. Al ambaŭ ni sincere gratulas kaj esperas, ke ili ankaŭ estonte sukcese ekspozicios. Bedaŭrinde ambaŭ ne plu estas membroj de ELF-AREK, kvankam ili estas el-staraj E-filatelistoj.

NI EN ALIAJ GAZETOJ

ESPERANTO en la informilo de ERINNOPHILIE
La laborgrupo ERINNOPHILIE ekzistas en la "Asocio de germanaj filatelistaj laborgrupoj", aliginta al la "Germanan Filatelistan Asocion". Tiu laborgrupo havas jenajn sekciojn: glumarkoj (nepoŝtaj markoj), bildkartoj, reklambildoj k.a.. En la Informilo n-ro 117 de marto 1996 aperis artikolo kun bildoj pri ELF-AREK kaj ties agado sur la kampo de glumarkoj.

Nia HIRSCH membras en tiu klubo kaj prizorgis la artikolon. Ni gratulas al li pro lia agado en tiu ne-E-Klubo!

STAMPOJ

Ĉ I N I O

SIPMOZIO PRI LA ESPERANTO EN LA GUBERNIO DONGFENG
Nia kara amiko Song SHENGTAN rapide reagis kaj respondis al nia demando pri tiu stampo en nia LVL 25/104, pago 9. Li skribis:
"S-ano WEI Shan, ĝenerala sekretario de CHANGCHUN-a E-asocio kaj mia amiko, informis, ke tiu stampo kaj la surpreso de la MAO-eldiro sur la rato-jara TUT-PK estas farita de la E-asocio por memorigi la E-kunvenon en la sudo de la provinco JILIN. Nek poŝtejo, nek la PM-kompanio posedis tiun stampilon. Do, temas pri pure privata stampo".

Novaj stampoj el Ĉinio

Nia Zhang LINRUI informis pri la unuaj ĉinaj stampoj (TJ-NET) de 1996:



LVL-No: 1/96-243



LVL-No: 2/96-244



LVL-No: 3/96-245



LVL-No: 4/96-246



LVL-No: 5/96-247

dato	katalog-no:	LVL-no:	teksto
uzita en HAIKOU (pm-kompanio)			
1996 04 02	243	1/96	La 3-a Azia Vintra Sportkunveno

daŭrigo: stampoj TJ-NET

1996 08 02	244	2/96	Funkcias submara fotokabla sistemo inter Ĉinio kaj Suda Koreio
1996 18 03	245	3/96	Shenyang Imperia Palaco
1996 20 03	246	4/96	La Centjara Jubileo de la fondiĝo de la ĉina posto

uzita en CHANGSHU (pm-kompanio)

1996 20 03	247	5/96	La Centjara Jubileo de la fondiĝo de la ĉina posto

Ĉiuj stampoj estis desegnitaj de ZLR. Koran dankon pro la informoj.
Tiuj stampoj aperis lige kun la eldono de novaj pm en la unua tago.

D A N I O

Kompletigo de la danaj maŝin-varbstampoj
Grete NIELSEN el Næstved, Danlando, afable informis pri poŝtoficejoj, kiuj ĉi-jare ankaŭ uzas maŝinvarbstampilojn por propagandi Esperanton.. Ni kore dankas al ŝi:

22.01. 1996 ĝis ?? - Sydjyllands Postcenter

11.03. - 19.04 1996 - Fyns Postcenter. DK-5090 Odense

13.05. - 21.06.1996 - Nordsjællands Postcenter, DK-2633 Taastrup

15.07. - 30.08 1996 - Københavns Postcenter, DK-0900 København

23.09. - 01.11.1996 Østjyllands Postcenter, DK-8245 Århus


Bildoj de tiuj stampoj sekvos en la venonta LVL.

F R A N C I O

F 67 - dulingva varbstampo de AMIENS C.T.C

Tiu stampo ekzistas ankaŭ en du variaĵoj:

1-a en la datstampo la tempindiko estas anstataŭigita per P.P.
2-a ŝangita datstampo, nun kun 80 AMIENS CTA kaj kun la indiko: P.P.



daŭrigo: FRANCIO

F 68 - 50-a Kongreso de Rhone-Alpes Esperanto-Federacio

Tiu stampo ankaŭ ekzistas kun ducirkla datstampo sen horindiko.

Variaĵo de tiu stampo: post la datindiko troviĝas: P.P.. En la varbkliŝo mankas apud la urbo la datindiko.

50e CONGRES DE LA FEDERATION
RHONE-ALPES D'ESPERANTO
LA LANGUE INTERNATIONALE
VALENCE 30/31.03.96
VALENCE HUGO 18-3-96



50e CONGRES DE LA FEDERATION
RHONE-ALPES D'ESPERANTO
LA LANGUE INTERNATIONALE
VALENCE 30/31.03.96
VALENCE HUGO



6 au 9 AVRIL 1996 51ème Congrès d'
ESPERANTO
ORLY ★
ORLY AEROGARE 25-1-96



F 69 - 51-a Kongreso de SAT-Amikaro en Orly
La poŝta giĉeto en ORLY uzis ankaŭ datstampilon kun P.P.
Dankon al nia AMOUROUX pro la senditaj informoj.

Pri jenaj stampoj ankoraŭ ekzistas duboj:


BRITUJO



FIRST DAY OF CAMP
AMIKARO
WARWICK 26 JULY 1979

Stampo: AMIKARO DE WARWICK 1979
Tiu stampo troviĝas nek en mia katalogo de 1983 kaj ĝiaj 6 suplementoj (1989), nek en la Granda Katalogo de HIRSCH. Mi iam vidis kopion kaj ion legis pri ĝi. En nia LVL mi ne trovis notojn. Eble tiu stampo elfalis pro mia neatento. Se mi ĝuste memoras, tiu stampo fontas el skolta poŝtejo, kiu funkciis en la urbo WARWICK (GB) dum jamboreo (tendaro de skoltoj).
La vorton AMIKARO la desegnisto formis el arbobranĉoj. Londona filatelisto, s-ro RICKENBACH, skribis en letero al nia AMOUROUX, ke ĝi estas posta. Mi pledus por ĝia akcepto en nia katalogo.
Rimarko de Hirsch: Antaŭ ol ni listigu tiun stampon en nia katalogo, devas esti tute klare, ĉu la stampo estis uzita por E-jamboreo de E-Skolta-Asocio, aŭ ĉu hazarde estis prenita la vorto AMIKARO. Do, ni nepre devas scii, ĉu temas pri stampo por E-aranĝo aŭ ne-E-aranĝo, kiu uzis E-vorton en la stampo. La sama jam okazas en Ĉinio. Ni atendas la reagon de niaj kolektantoj.

daŭrigo: STAMPOJ



Enigma stampo de 1960 de SU

En jam forgesita skatolo plene de korespondaĵoj de 1960 mi trovis koverton kun tiu ĉi ŝajne posta E-stampo de la urbo Krasnodar (SU) kun la dato: 25 12 1960. Teksto (en la kirila): Den Esperantista (Tago Esperantista). Ĉu la stampo vere estas poŝta, mi ne scias. sed ĝi havas ĉiujn indikojn pri poŝteco: "CCCP - Krasnodar-dato". El tiuj jaroj mi havas plurajn stampojn de la Sovet-Unio. kiuj aspektas similaj kun samaj indikoj.
Ili estas poŝtaj kaj en la *Kosmo -katalogo*.
Se vi havas la saman stampon kaj/aŭ scias pli pri ĝi, bv. skribu al mi.

Rimarko de HIRSCH:
Mi ankaŭ posedas tiun stampon, sed mi dubas pri la poŝteco de ĝi. La tuta stampo aspektas kiel desegnaĵo, ĉefe la literoj. Mi atendas la reagon de niaj membroj.

Nepoŝta jugoslava stampo??
Mi ĝin trovis inter la postlasaĵoj de nia forpasinta amiko *Kurt Lindström.* La originala, poŝta stampo havas en la suba parto la urbnomon *Beograd* kaj apud ĝi, en la sama grandeco, la daton 28. 7. 1973. La ĝis nun nepoŝta (?) estas samaspekta, sed havas la diametron de 40 mm kaj ĉe la urbnomo ne la daton. La koloro ankaŭ estas verda.

Rimarko de HIRSCH:
Tiu stampo jam delonge estas katalogita sub la numero: YU 22 c 40 o. Ĝi ricevis la piednoton 2): *"...mankas la konfirmo de la poŝteco."* La piednoto ankaŭ validas por la stampoj 23 ve kaj 27 ve,. Kvankam mi jam 1989 faris tiun piednoton kaj mi intertempe forvendis pli ol 80 katalogoj, mi gis nun ne ricevis iun reagon. Do, versajne tiuj stampoj tamen estas poŝtaj?

AFRANKSTAMPOJ

Nova variaĵo de la afrank-stampo de HIRSCH, Bad Hersfeld


Iom post iom la afrankstampoj de Germanujo devas ŝanĝi ĝian aspekton. Pro la unuiĝo de Germanujo unue sanĝiĝis la datstampoj pro la novaj poŝtkod-numeroj. Nun la ŝtata germana poŝto privatigis kaj el la nomo DEUTSCHE BUNDESPOST (Germana Federacia Poŝto) farigis la nomo DEUTSCHE POST AG (Germana Poŝto Akcia Societo). Sekve la valorstampo ricevis nun ankaŭ novan bildon. Malaperis la plaĉa antikva poŝtkorno en ĝi kaj nun la lokon okupiĝas moderndesegna korno. La nova poŝta blazono jam antaŭ la privatigo estis trovebla sur multaj malnovaj valorstampoj. Krome la

daŭrigo: AFRANKSTAMPOJ

afrankstampo nun havas la numeron: E01 - 4047. Cetere vi tute ne bezonas klopodi iel ie aĉeti gin, sed vi ĉiuj ĝin akiras kune kun nia LVL! Atentigo de Hirsch: Tiu ŝanĝo de la valorkliŝo kostis min nur iomete pli ol DM 850,--.

Ĉeĥa afrankstampilo kun nova kliŝo por la 81-a UK en Prago-
Nia Hasala informas:
"---Ek de la 01 02 1996 la CZ-poŝtejo en Straznice propagandas la 81-a UK de Esperanto, okazonta ĉi-jare en PRAHA, per nova varbkliŝo en ĉeĥa lingvo:
"81-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO Praha 20 - 20.7.1996
Gravuris: Karel PAVLICEK, projektis: inĝ. ark. Karel KUCA.

LKK preparas duan afrankmaŝin-kliŝon. Oni intencas aperigi pliajn kongresajn filatelaĵojn, ekz. reko-marko.
Koran dankon pro la informoj al nia HASALA.








REKO-MARKOJ

La reko-marko de Gdynia (PL), katalog-numero 8, iomete sanĝis. Ek de 1988 (?) la vorto *"Zamemhofa" nun estas inter- krampoj.* Do nun ekzistas: 8-1 sen krampoj kaj 8-2 kun krampoj.





TUTAĴOJ

TUT-aĵaj poŝtmarkaj eltondajoj uzitaj kiel poŝtmarkoj

Mi posedas sur registrite sendita Zamenhof-TUT-koverto de Sovet-Unio aldone gluitan eltondaĵon de la 5-kopeka valor-enpreso (pm). Vidu la




daŭrigo: TUTAĴOJ

bildon. La du Zamenhof-portretoj okulfrape diferenciĝas per diversaj koloroj:
a) dekstre: flave-verda portreto, vizaĝo neklare presita (barbo!)
b) maldekstre: bruna portreto vizaĝo tre klare presita (barbo!)

Se vi ankaŭ posedas pli grandan kvanton de tiuj TUT, valorus kompari ilin koncerne de la portreta koloro. En la montrita kopio la kolor-diferencoj estas ekstremaj, sed ekzistas ankaŭ malpli elstaraj nuancoj.

Mi ankaŭ posedas plurajn kovertojn, poŝte senditajn kun eltonditaj valor-enpresoj (pm)de la hungara TUT-PK de la 34-a IFEF-Kongreso. Pri la "oficialeco" mi scias nenion. La juroroj en FIP-ekspozicioj ne protestis kontraŭ elmontro de tiaspecaj filatelaĵoj en ekspozicio. En la iama GDR estis eble, uzi afrankcele tiajn eltondaĵojn, ŝajne ankaŭ en F.R. Germanujo, supozeble ankaŭ en Hungario kaj Sovet-Unio.



GLUMARKOJ

Kampanjo - glumarkoj de Sveda Esperanto-Federacio (SEF)
Nia Anna-Greta Strönne sciigis pri novaj "kampanjo-glumarkoj, vendataj de Sveda Esperanto-Federacio (multekostaj). Ekzistas rektangulaj kaj kvadrataj. Ili montras la simbolon de la kampanjo kun helika "e". Laŭ SEF ĝi simbolu la komunikadon inter homoj en Esperanto. La helika "e" simbolas elektronikan komunikadon (INTERNET). La "e" simbolo ne volas forigi la verdan E-stelon, sed intencas funkcii en tiu ĉi tempo, kiam regas granda intereso pri la *Internet*. La glumarkoj estas dukoloraj, verda kaj nigra kaj ankaŭ memgluaj.





66-a SAT-Kongreso en Kazanlak (BG) 1993

Nia membro Johannes JANKOWSKI preparis glumarkojn por tiu kongreso.

BG 39-A Du virinoj en roza kampo, teksto supre maldekstre

BG 39-B Sidanta virino, sube teksto (diversaj mezuroj)

daŭrigo: GLUMARKOJ

Tiuj glumarkoj ne estas eldonitaj de la OKK. Mi ilin trovis sur letero de nia JANKOWSKI:





69-a SAT-Kongreso en Sankt Peterburgo (SU) 1996

Por la ĉi-jara SAT-kongreso aperis el diversaj fontoj multaj glumarkoj. Tial estas malfacile prijuĝi, kiuj estas oficialaj kaj kiuj ne. Se ni ne ricevos aliajn informojn, tiam ni enprenos ĉiujn en nia katalogo sub la nova landnomo: RUSLANDO;







1-1: ĉirkaŭa teksto:
6. SAT.Kongreso 1926 - 13-20-7-96 - 69.SAT.Kongreso 1996 - Sankt-Peterburgo. (PM-reprodukto de 1926)

1-2: teksto supre kaj malsupre:
69.Internacia Proletaria Esperanto-Kongreso 1996 Sankt Peterburgo (PM-reprodukto de 1926)

2: 69.Internacia Proletaria 1996 Esperanto Kongreso (ĉirkaŭ la glm) (en la mezo en Sankt Peterburgo kaj sube arka ponto kun E-stelo kaj SAT

1-1. 1-2 kaj 2 estas presitaj sur memgluaj folioj, horizontale por 9 glm. Ili ekzistas en verda kaj nigra koloroj.



3: 69. Internacia Proletaria Esperanto Kongreso 1996 en Sankt Peterburgo. Meze la mapo de Europo kun la pozicio de Sankt Peterburgo kaj la enskribo: 69. SAT-kongreso.

Tiu glumarko estas 6-foje presita sur memglua folio (7x3) miksita kun glm 1-3 kaj aliaj sendataj malnovaj E-varb-glm. Ekzistas en verda kaj nigra koloroj.

La glumarkoj haveblas en kompleto (entute 4 folioj), kontrau 5 IRK inkl. de afranko ĉe s-ano Gottfried HOFMANN. Flemming-Str. 42, D-09116 CHEMNITZ. Tiuj glumarkoj ankaŭ ne estis eldonitaj de la OKK.

La sekvajn glumarkojn laŭŝajne ankaŭ eldonis nia membro Johannes JANKOWSKI:

daŭrigo: GLUMARKOJ



4: 1926 Sankt Peterburgo 1996
SAT - Kongreso
meze: jubilea E-simbolo kun
E-stelo, urba blazono, 69
ronda- diversaj mezuroj



5: Anstataŭigita teksto en la kopio de la pm de SU 1926:
Supre: SANKT-PETERBURGO 1996-07-13/20
Sube: 69 INTERNACIA PROLETARIA 69
ESPERANTO-KONGRESO
1996
Mezuro: rektangulo, diversaj mezuroj
Rimarko de Hirsch: Kvankam tiuj glumarkoj ne estis eldonitaj de la koncernaj LKK aŭ OKK, mi enprenos ilin en nia katalogo. Se iu havas kontraŭan opinion, tiam skribu al mi.

BILD-POŜTKARTOJ

5-a UK 1909 en Barcelona

Krom la surloke eldonitaj bildkart-serioj, ankoraŭ aperis alia serio en Leipzig (Germanujo). Al la demando de la redaktoro en la lasta LVL tuj reagis nia AMOUROUX. Tiun serion kun famaj personoj kaj bildoj de la kongreso eldonis la "Eldonejo Esperanto",Leipzig:

1- Alfonso XIII-a, reĝo de Hispanujo, honora prezidanto de la UK

2- Generalo Sebert, prezidanto de la "Konstanta Komitato de la Kongresoj", ges-roj Zamenhof, Fred Pujulà y Vallés, prezidanto de la kongreso kaj ties edzino, sekretariino de la kongreso

3- 6-an de septembro - malferma kunsido (I)

4- 6-an de septembro - malferma kunsido (II)

5- 6-an de septembro - malferma kunsido (III)

6- 8-an de septembro - la Ruĝa Kruco, ekzercoj per Esperanto (I)

7- 8-an de septembro - la Ruĝa Kruco, ekzercoj per Esperanto (II)

8- 8-an de septembro - literatura konkurso "Floraj Ludoj" en la borso

9- 9-an de septembro - ekskurso al Tibidabo

10- la rondo-danco esperantista

11- 10-an de septembro - bicikla konkurso por honori la esperantistojn

daŭrigo: BILD-POŜTKARTOJ

12- kanto por honori la esperantistojn

13- 15-an de septembro - solena akcepto pere de la urbestraro en la granda halo de la ekspozicio de Valencia

14- 16-an de septembro - la esperantistoj en Valencio

Nova demando:

Kiu scias ion pri la"ilustritaj poŝtkartoj"(bild-poŝtkartoj) de la Germana Esperanto-Kongreso 1909 en Gotha, eldonitaj de L.SCHLAF? Bonvenaj estas informoj kaj kopioj.

Skribu ankaŭ pri viaj E-bildkartoj. Ili estas valoraj dokumentoj pri la E-movado. Bedaŭrinde pli kaj pli la scio pri ili malaperas kun la forpaso de niaj E-pioniroj,

Bild-Poŝtkarta-serio de la "7-SAT - Kongreso 1927" en Lyon (F)

La OKK de tiu SAT-Kongreso eldonis serion de bild-poŝtkartoj pri urbaj vidindaĵoj de Liono. Ili troviĝas en kajero kun kolora kovrilo. Jen la priskribo de la tuta serio:

Kovrilo - Ponto de la Guillotiere kun malsanulejo

tekstfolio pri Liono

1 - Vido de Lyon-Vaise kaj la Ora Monto

2 - La Placo Bellecour kaj la Monteto de Fouviere

3 - La Ponto Wilson

4 - La Ponto Lafayette

5 - La Fontano Bartoldi

6 - La Katedralo Sankta Johano

7 - La Prefektejo

8 - Barkveturado sur la lago en la parko de la Ora Kapo

9 - La stacidomo de Lyon-Parrache

10 - La stacidomo de Lyon-Brotteaux

11 - La Palaco de Komerca Borso

12 - La ponto de la Guillotiere, la malsanulejo (542) kaj la Monteto de Fourviere

13 - La Placo kaj la Fontano de Jacobins

14 - La Operejo

daŭrigo: BILD-POŜTKARTOJ

15 - La Placo de l'Respubliko kaj la Monumento Carnot

16 - La Ponto de l'Universitato kaj la Fakultatoj

17 - La fasado de la Urbdomo

18 - La Teatro de Celestins

19 - La Placo Carnot kaj la Monumento de la Respubliko

20 - La Placo Bellecour kaj la statuo de Ludoviko XIV-a

Sur la adresflanko, supre maldekstre, troviĝas la teksto:

VII-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda
LYON: 12-16 Augusto 1927
Oficiala Poŝtkarto no .... (1-20)

En Liono tiutempe estis vigla E-movado kun 4 E-kluboj. Iel elstaras la nomo de Alice FARGES. Jam en 1908 ŝi prizorgis la E-oficejon. Ŝi prizorgis la eldonon de la E-bild-poŝtkartoj, E-glumarkoj, eĉ "E-juveloj". De la glumarkoj nur estas konataj tiuj de la Lyon-a Foiro de 1929 kaj 1934. Ankoraŭ hodiaŭ la E-movado en Liono vivas, eĉ vigle.

LYON — La stacidomo de Lyon-Brotteaux

8.-18. MARTO 1934
LYON'A INTERNACIA FOIRO

VIIa Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda
LYON: 12-16 Aŭgusto 1927
Oficiala Postkarto no 17
INTERNATIONALE DE LYON 1ER LUNDI DE MARS
15 VIII 27 16 H RHONE

daŭrigo: BILD-POŜTKARTOJ

Bild-poŝtkarta-serio: "Vizitu la Foiron de Lyon dum Marto

Iam antaŭ 1930 aperis serio kun 20 diversaj BPK por popularigi la tiutempan, ĉiu-jaran Foiron dum marto. Ili ĉiuj havas supre skribitan tekston kaj bildflanke klarigojn pri la urbaj vidindaĵoj. La Foiro havis apartan E-Fakon kadre de la Eksterlanda Propagando kaj Eksporta Bulteno, Tiun E-fakon gvidis la UEA-delegito Richard Levin:



LYON — Foira Palaco - Centra Halo.

La serio estis siatempe vendata en bluaj kovertoj. La "dento de la tempo" ege damaĝis ilin, feliĉe ne la bildkartojn.

BONDEZIR-SALUT-BILD-POŜTKARTOJ

Ili estas pli popularaj en niaj vicoj ol mi supozis. Nia estimata Elda DÖRFLER (I) laste min ĝojigis per alsendo de koloraj reproduktaĵoj de la bondeziraj (salut-) bildkartoj de "TUCKS POŜTA KARTO", kiuj certe meritus piratan reeldonon. De ili ekzistas 6 diversaj. Ili havas la pk-serio-numero 9964 kaj estis presitaj en Anglujo. Eble tiu serio apartenas al la plej bela ĝis nun. Tial nur mallonge la priskribo de la bildflanko:

1- ESPERANTAJN BONDEZIROJN
La Zamenhofa solvo de la malfacilaĵoj de internaciaj kongresoj

2- SAMIDEANAJN BONDEZIROJN
Esperanto-The Language of the Future
(Esperanto-La lingvo por la estonteco)

3- BONDEZIROJN LA PLEJ SINCERAJN

4- AMIKAJN SALUTOJN
Ho! Eksonu nova - kanto- pri lingvo Esperanto...

5- KORAJN SALUTOJN
Forte staras muroj de miljaroj - Inter la popoloj dividitaj...



daŭrigo: BILD-POŜTKARTOJ


6- ESPERANTO (E-stelo, angelo, du virinoj, terglobo, floroj) Ĝoje l'espero nin jam karesos, proksiman celon montrante...

Eldonjaro ne estas konata . Laŭ la stilo mi supozas 1912/1914. Se v havas poŝte senditan, tiam bv. kontrolu la datstampon. Eble sendu a mi kopion, dankon.

Temo ESPERANTO en "Picture Postcard Monthly" marto 1995

Ke ekzistas specialaj gazetoj pri bild-poŝtkartoj, mi ĝis nun ne sc Nun nia HIRSCH sendis al mi kopion de dupaga, riĉe ilustrita artik pri E-bild-poŝtkartoj en la supre menciita gazeto. La artikolon v Liz McKernan. En la du paĝoj videblas E-bild-poŝtkartoj, aperintaj jaro 1914, i.a. ankaŭ la supre menciita E-BPK "AMIKAJN SALUTOJN".

E-bild-poŝtkarto de TRIESTO 1906



Nia Elda DÖRFLER ankaŭ sendis kopion de E-BPK el la jaro 1906. La b montras havenon kun multaj veloŝipoj. Inter ili unu ŝipo kun velo kiu videblas granda E-stelo. Por BPK-kolektantoj valora peco el la tempo de la E-movado en TRIESTE. Tiu urbo en tiu tempo, ĝis 1918, a tenis al la Aŭstria Imperio. Ĝuste en 1906 fondiĝis tie la E-grupo precize antaŭ 90-jaroj!

PERIFERIE DE LA FILATELO

Inter la ge-Esperantistoj ekzistas ankaŭ kolektantoj de diversspec poŝtkartoj, kovertoj, banderoloj k.a.. Mi provas listigi ilin, havas sufiĉe grandan stokon de tiu materialo. Se inter via materia estas io, kiun mi ankoraŭ ne listigis, bv. sendu fotokopio(j)n. Es ne mia intenco, katalogi tiun materialon, sed mi nur volas montri,

daŭrigo: Periferio de la Filatelo

ekzistas, Ĉefe interesa estas la materialo de 1905 - 1935. El la po
jaroj ne ekzistas tiom da diversa materialo. Ankoraŭ pli rara estas
materialo antaŭ 1905. Mi certe ankoraŭ ne listigis ĉiun materialon,
estas komenco.
Richard Hi

normalaj POŜTKARTOJ:

1- nur kun la surpreso POŜTKARTO

2- nur kun la surpresoj POŜTKARTO en E kaj nacilingve

3- kun la surpreso de POŜTKARTO kaj surpresita sendinto (asocio, institucio, aranĝoj k.a. (ne privatuloj)

4- kun la surpreso de POŜTKARTO kaj varbteksto en Esperant sur la adresflanko

5- la sama, sed kun varbteksto nacilingve

6- la sama, sed kun varbteksto en Esperanto kaj nacilingve

KOVERTOJ:
(mi ne listigas kovertojn kun surpresita privata sendinto kaj kun gumaj varbstampoj)

1- kun maldekstra varbteksto en Esperanto

2- kun maldekstra varbteksto nacilingve

3- kun maldekstra varbteksto en Esperanto kaj nacilingve

4- kun surpresita sendinto (asocioj, institucioj, aranĝoj, sed ne kun privataj adresoj)

5- la sama, sed kun aldonaj E-varbtekstoj/varbbildoj

6- la sama, sed kun aldonaj E-kaj nacilingvaj varbtekstoj

GAZETBANDEROLOJ:
Ekzistas kolektindaj gazetbanderoloj, ekz. de UEA el la tempo fine de 1929, komence de 1930.
Ankaŭ SAT uzis interesajn gazetbanderolojn

BILD-POŜTKARTOJ:
Sur ĉiu PK estas presita la vorto POŜTKARTO adresflanke nur en E-au E-kaj nacilingve

kun bildo kaj E-enksribo dorsflanke sed nenio en E adres flanke

la sama, sed ankaŭ E-enskribo(j)-klarigoj adresflanke

la sama, sed kun aldona nacilingvo aŭ diversaj nacilingvo

kun desegnita bildo dorsflanke, parte ankaŭ kun E-enskrib -klarigoj adresflanke (varbpoŝtkartoj por aranĝoj, por Es ranto k.a.

daŭrigo: Periferie de la Filatelo

la sama, sed kun la portreto de d-ro Zamenhof, Z- kaj E-monumentoj dors-kaj adresflanke (kun E-kaj nacilingvaj enpresoj)

la sama kun bildoj de famaj Esperantistoj, parte eĉ en serioj.

la sama, sed kun bildo de la sendinto nur adresflanke kaj enskriboj en E.

diversspecaj bondezirkartoj, ankaŭ duoblaj faldkartoj okaze de Kristnasko, Nova Jaro, Pasko. Naskiĝtago, Jubileoj kaj aliaj. Ili estas kun fotoj de urboj, pejzaĝoj, pentraĵoj kaj desegnaĵoj. La enskriboj estas aŭ nur en E. aŭ en E. kaj nacilingve,

kun bildo dorsflanke kaj surpresoj en E:
Saluton el....... Vizitu.......... aŭ varbado por E-arango.
mencio de (historia) okazaĵo ktp.

okaze de diversaj UK'oj kaj SAT-kongresoj aperis serioj de BPK, ekzemple: 1909 en UK Barcelona (E), 1927 SAT-kongreso en Liono (F), 1928 UK en Antverpeno (B), 1930 okaze de Foiro en Liono.

Sur la filatela merkato la prezoj por tiuj BPK estas tre diferencaj. Tio ankaŭ dependas parte, kiu ofertas la kartojn. Ekzemple la BPK de Barcelona, temas pri 2 serioj po 15 pecoj: 1 BPK kostas inter DM 40,-- ĝis DM 60,--, sed mi ankaŭ jam vidis, ke la 2 serioj, do 30 BPK, estas ofertitaj por DM 120,--. Do, granda diferenco.

==*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*==*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*

Informilo de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista-Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj)
Oficielles Organ de ArGe ESPERANTO (laborgrupo Esperanto in der (en la germana) VPhA (Asocio de la Filatelaj Laborgrupoj)

Redaktoro: Rudolf Burmeister, Max-Müller-Str. 62, D-09123 CHEMNITZ

Prezidanto: Hermann Heiss, Lohstr. 48, D-77704 OBERKIRCH

Kasisto: Rolf Beau, Jacobstr. 9, D-04105 LEIPZIG

BANKOJ: Sparkasse Leipzig: Konto-Nr.: 1 190 223 208
Bankkodo (BLZ): 860 555 92

Postbanko Nürnberg: Konto-Nr.: 036 6737-855,
Bankkodo (BLZ): 760 100 85

UEA-konto: elfx-r

Kotizoj 1996: okcidentanoj: DM 30,-- (15 IRK)
orientanoj: DM 20,-- (10 IRK)

Stampobanko: Werner Heimlich, Fröbelstr. 4, D-29614 SOLTAU

Kompostis, presis kaj ekspedis: Richard Hirsch,
Lambertstr. 12,
D-36251 BAD HERSFELD